

M.- Parolas Michel Frésard kaj Claude Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Vi certe bone memoras, ke lastfoje ni studis la vokalajn sonojn en esperanto.

Cl.- Jes. Sed ŝajnas al mi, ke vi diris nenion al mi pri iliaj teoriaj karakterizoj.

M.- Vi tute pravas. Do pri tio sciu, ke ĉiu vokalo havas du karakterizojn. La unua estas laŭ la grado de aperturo de la buŝa truo. La dua estas laŭ la punkto de artikulado en la buŝa kavo ekde la pleja antaŭo ĝis la pleja malantaŭo. Tiel ni havas unue la "i", kiu estas fermita kaj antaŭa, due la "e", kiu estas meza kaj duonantaŭa, trie la "a", kiu estas malfermita kaj centra, kvare la "o", kiu estas meza kaj duonmalantaŭa, kaj kvine la "u", kiu estas fermita kaj malantaŭa.

Cl.- Konsekvence, laŭ via klarigo, kiam oni nomas la vokalojn, oni prefere ne devus diri "a", "e", "i", "o", "u" sed "i", "e", "a", "o", "u"...

M.- Mi rimarkas, ke vi havas logikan pensmanieron kaj tion mi ŝatas. Jes, fakte oni prefere devus diri "i", "e", "a", "o", "u".

Cl.- Tamen ĉiel via klarigo pri la teoriaj karakterizoj de niaj kvin vokaloj ŝajnas al mi tro komplika. Ĉu vi povus doni al mi resuman tabelon pri ili?

M.- Tute ne, ĉar tio estos precize via hejma tasko por nia venonta leciono. Provu desegni tiun tabelon. Ĉe la vertikala akso vi metos la tri gradojn de aperturo de la buŝa truo, kaj ĉe la horizontala akso vi metos la kvin punktojn de artikulado en la buŝa kavo.
Cu ne?

Cl.- Jes, profesoro. Mi klopodos...

M.- Sed reale la centra temo de nia hodiaŭa leciono pri fonetiko estas la du esperantaj duonvokaloj. Ĉu vi scias, kio estas duonvokalo?

Cl.- Mi supozas, ke temas pri la "j" kaj la "ŭ"...

M.- Efektive. Aliflanke vi certe rimarkis, ke duonvokalo neniam aperas sola. Ĉiam ĝi akompanas vokalon, kun kiu ĝi formas diftongon.

Cl.- Kaj... kio estas diftongo?

M.- Estas malsimpla sono vokala. Kiam vi havas "o", vi havas simplan vokalon. Sed kiam vi havas... ekzemple... "oj", vi havas diftongon.

Cl.- Ĉu "jo" estas ankaŭ diftongo?

M.- Jes. Aliflanke kiam vi havas "oj", vi havas malkreskan diftongon, ĉar la duonvokalo estas malantaŭ la vokalo.

Cl.- Do kiam mi havas "jo", mi havas kreskan diftongon?

M.- Jes, ĉar la duonvokalo estas antaŭ la vokalo. Pri tio ni faru ekzercon! Bonvolu serĉi vorton, kiu enhavas la malkreskan diftongon "oj".

Cl.- tabloj

M.- Bone. Nun bonvolu serĉi vorton, kiu enhavas la kreskan diftongon "jo".

Cl.- vojo

M.- Tre bone. Nun pri la "ŭ" ni rimarkos, ke ni ankaŭ trovas ĝin en ambaŭ tipoj diftongaj, kvankam oni devas tuj diri, ke oni plej ofte renkontas ĝin en malkreskaj diftongoj. Estas en fremdaj vortoj, specife propraj, kie oni trovas ĝin en kreskaj diftongoj. Bone. Pri tio ankaŭ ni faru ekzercon! Bonvolu serĉi unue 3 vortojn kiuj enhavas... ni diru... la malkreskan diftongon "aŭ".

Cl.- hieraŭ - hodiaŭ - morgaŭ

M.- Bone. Nun bonvolu serĉi 3 vortojn, kiuj enhavas la kreskan diftongon fremdan "ŭa".

Cl.- Kumeŭaŭa - Ŭaŝintono - Ŭato

M.- Tre bone.

Nun je la fino de nia tria leciono pri fonetiko ni faros lastan ekzercon. Mi diros al vi ĉiujn kombinaĵojn eblajn kun la kvin vokaloj kaj la du duonvokaloj. Kompreneble mi miksos tiujn diftongojn por eviti la enuon. Vi diros al mi, kiujn kombinaĵojn vi supozas, ke oni povas renkonti en esperanto, kaj kiujn ne. Plie por ĉiu el tiuj, kiujn vi supozos renkonteblajn, vi donos al mi ekzemplon t.e. vorton, kiu enhavos la koncernan diftongon. Sed antaŭe... ĉu vi kapablas imagi, kiom da teoriaj kombinaĵoj diftongaj oni povas havi?

Cl.- Eble... dekojn...

M.- Jes, jes. Fakte estas 20.

Do nun ni faru la ekzercon.

1. "aj"

Cl.- kaj

M.- 2. "eŭ"

Cl.- Eŭropo

M.- 3. "ij"

Cl.- verŝajne ne ekzistas, ĉu ne ?

M.- 4. "oŭ"

Cl.- poŭpo

M.- 5. "uj"

Cl.- ujo, ĉu ne ?

M.- ne, ĉar ni havas la du silabojn 'u' kaj 'jo'.

Cl.- do eble : tuj

M.- tre bone

6. "aŭ"

Cl.- baldaŭ

M.- 7. "ej"

Cl.- plej

M. - 8. "iŭ"

Cl.- verŝajne ne ekzistas.

M. - 9. "oj"

Cl.- tagoj

M.- 10. "uŭ"

Cl.- ankaŭ verŝajne ne ekzistas

M.- jes.

11. "ŭa"

Cl.- ŭato

M.- 12. "je"

Cl.- je via sano

M.- dankon.

13. "ŭi"

Cl.- verŝajne ne ekzistas.

M.- 14. "jo"

Cl.- do, ujo

M.- tre bone

15. "ŭu"

Cl.- do, ne ekzistas

M.- 16. "ja"

Cl.- jaro

M.- 17. "ŭe"

Cl.- ne ekzistas

M.- 18. "ji"

Cl.- ankaŭ ne ekzistas verŝajne

M.- 19. "ŭo"

Cl.- eble en ĉinaj transskriboj, ĉu ne ?

M.- jes, tutcerte

20. "ju"

Cl.- ju pli bela

M.- bone.

Cl.- Nu, profesoro, ĉu en aliaj lingvoj, eble la franca ekzistas aliaj duonvokaloj ?

M.- Jes. En la franca ekzistas tri el ili, la du de esperanto kaj la 'i'.

Cl.- Bonvolu doni al ni kelkajn ekzemplojn.

M.- Plezure. Unue mi menciu la 'i'. En la franca ĝi povas aperi en pozicio aŭ kreska, kiel en la vorto 'radio', aŭ malkreska, kiel en la vorto 'fenouille'.

Cl.- Do en la vorto 'radio' ni havas la diftongon 'jo'.

M.- Jes. Due mi menciu la 'u'. En la franca, krom evidente en fremddevenaj vortoj, ĝi nur povas aperi en pozicio kreska, kiel en la vorto 'oui'.

Cl.- Do en la vorto 'oui' ni havas la diftongon 'uj'.

M., Jes. Kaj kiel vi rimarkas, la vorto ‘oui’ estas finfine nur diftongo. Nun, ni menciuj la trian duonvokalon francan, kiu ne ekzistas en esperanto. Kiel dirite antaŭe, ĝi estas la ‘u’, kiu nur aperas en pozicio kreska, kiel en la vorto ‘huit’.

Cl.- Do en la vorto ‘huit’ oni havas la diftongon ‘ŭi’.

M.- Efektive. Pri tiu ĉi duonvokalo mi devas diri al vi, ke ĝi estas la plej malfacile prononcebla. Eĉ estas francparolantoj, kiel la franclingvaj belgoj, kiuj ne povas elparoli ĝin kaj anstataŭas ĝin per la duonvokalo, ‘u’. Laŭ ĵus dirite, ĉu vi povas prononci la vortojn ‘huit nuits’, kiu estas ‘ok noktoj’, kiel la franclingvaj belgoj ?

Cl.- do, ili dirus ‘ui nui’..

M.- Ĝuste. Nun bonvolu elparoli tion laŭ la normala prononcmaniero franca ?

Cl.- do : ‘ŭi nŭi’.

M.- Bone. Dankon.

Cl.- Profesoro, ĉu ni povos baldaŭ nun studi la esperantajn konsonantojn ?

M.- Volonte, despli, ke tia jam estis mia intenco. Ĉu vi scias, kiom da konsonantoj ni havas en esperanto ?

Cl.- Do, se ni forprenas tiujn vokalojn, verŝajne dudekojn, ĉu ne?

M.- Efektive. En esperanto ni havas ekzakte 21 konsonantojn. Nun, laŭ la alfabeto ordo, provu diri ilin al mi.

Cl.- do : bo, co, ĉo, do, fo, go, ĝo, ĉu ne? Ĉu ĥo ankaŭ estas konsonanto?

M.- Ĉar mi decidis studi simpligitan fonetikon, mi dirus al vi ke jes, sed bonvolu daŭrigi vian serion.

Cl.- Poste do : ĥo, ĵo, ko, lo, mo, no, po, ro, so, ŝo, to, vo kaj zo.

M.- Bone. Pri ‘ĥo’ vi scias, ke ĝi tendencas malaperi pli kaj pli.

Cl.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Michel Frésard kaj Claude Gacond diras al vi : ĝis la venonta sabato!